# RETKOMUNIKOJ 6/2009

ĈEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA kaj ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonaĵojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

ENHAVO:


1. 95-a UK en Havano
2. Komputila seminario en Svitavy
3. Laborgrupo pri tradukado de turismaj materialoj
4. Radio Varsovio ankaŭ por komencantoj
5. Michael Jackson avertanta (kun subtekstoj en Esperanto)
6. Ĉeĥa Esperanto-Junularo aktivas (oficiala organo de ĈEJ)
7. Kalendaro de Esperanto-Aranĝoj
8. Laste sed grave: Bondeziroj


## 1. 95-a UK EN HAVANO

La 95-a Universala kongreso de Esperanto okazos de la 17-a ĝis la 24-a de julio 2010 en Havano, ĉefurbo de Kubo. Jen kelkaj gravaj informoj por tiuj, kiuj planas partopreni:

La plej favora aliĝperiodo finiĝas je la 31-a de decembro 2010, post tiu dato la kotizoj senteble altiĝos. Prefere aliĝu rekte („on line“) kaj sendu kopion de la aliĝilo al la ĉefdelegitino de UEA por Ĉeĥio Lucie Karešová, Havlíčkovo nám. 1, 130 00 Praha 3, rete Lucie.Karesova@seznam.cz . Sed vi anakaŭ povas nur elŝuti la aliĝilon ĉe http://www.uea.org/kongresoj/uk_alighilo.php kaj sendi ĝin al ŝi. La pago en Kč eblas al la konto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio laŭ la indikoj, kiujn vi trovos en la antaŭlasta paĝo de ĉiu numero de Starto. Kaze de iu malklaraĵo rilate al la pagoj bv. kontakti la kasistinon de ĈEA Libuši Hýblovou LibuseHyblova@seznam.cz. La nuna aliĝkotizo estas por IM de UEA 3240 Kč, por nemebroj 4050 Kč, por junuloj, kunuloj kaj handikapuloj 1620 Kč.

Atentu: se vi ne estas individuaj membroj (IM) de UEA, ne pretervidu, ke valoras aliĝi almenaŭ por unu jaro, ĉar la diferenco en la aliĝkotizo inter membroj kaj nemembroj de UEA estas senteble pli alta ol la kongreskotizo de kategorio „Membro kun Jarlibro“ (MJ), kiu kostas 420 Kč. Vi povas aliĝi ankaŭ kiel IM de UEA rekte ĉe http://db.uea.org/alighoj/alighilo.php . Eventualajn demandojn rilate al la membreco de UEA vi direktu al la supre menciita retadreso de nia ĉefdelegitino, kiun vi ne forgesu ankaŭ informi pri via reta aliĝo.

La internacian Flugkaravanon al la UK kun semajna turisma programo por ekkoni la ĉefajn turismajn allogaĵojn de Kubo organizas komune Vojaĝagentejo KAVA-PECH kaj la vojaĝoficejo Adventura, havanta riĉajn spertojn rilate al Kubo. La karavano estos kiel tradicie internacia jam dekomence, ĉar jam aliĝis ankaŭ eksterlandaj partoprenontoj. Forflugo de Prago tra Parizo estas la 11-a de julio. Pli da informoj ĉe www.kava-pech.cz/kubo aŭ chrdle@kava-pech.cz .

## 2. KOMPUTILA SEMINARIO EN SVITAVY

Okazos sabate la 23-an de januaro en Esperanto-muzeo kaj lerneja komputilejo. Temoj: „Kontribuado al la nova ĈEA retpaĝaro kaj al la asocia multmedia datumbazo“ kaj „Borso de utilaj komputilaj trukoj“. Bazaj komputilaj kapabloj estas bezonataj. Partopreno senpaga. Ni antaŭĝojas viajn aliĝojn ĝis la 10-a de januaro ĉe datumbazo@esperanto.cz

## 3. LABORGRUPO PRI TRADUKADO DE TURISMAJ MATERIALOJ

Multaj E-tradukoj de tekstoj pri turismaj/kulturaj vidindaĵoj de Ĉeĥio estis en pasinteco jam faritaj. Se vi trovus tiajn materialojn en via arkivo, bv. sendi ilin ĉu elektronikforme al etradukado@esperanto.cz, ĉu perpoŝte al Pavla Dvořáková, Gregorova 2563, 397 01 Písek. Same ni bonvenigas interesiĝantojn pri pretigo de novaj tradukoj kaj de ekzercaro kaj terminologia vortareto por tradukemuloj. Pluraj kluboj (i.a. Olomouc, Šumperk, Česká Třebová k.a. ) jam aliĝis al la traduka projekto. Ĉu ankaŭ vi volas fortigi niajn vicojn? Por nespertuloj lingva subteno estas garantiata!

## 4. RADIO VARSOVIO ANKAŬ POR KOMENCANTOJ

Ĉe la adreso: http://www.polskieradio.pl/eo atendas vin ĉiam la plej novaj - lastsemajne prilaboritaj kaj elŝuteblaj - E-elsendoj de Pola Radio.
Jen la konsilo por la komencantaj aŭskultantoj: Se vi ankoraŭ trovas malfacilon aŭskulti normalan parolritmon uzu malrapidigilon, kiu ekzemple troviĝas ĉe Windows Media Player. Unue alklaku la titolon: >nun aŭdigataj<, sekve faru la samon kun la aperanta vorto – >plibonigoj<. La tria paŝo estas alklaki la informon >konfuguracio de reproduktorapideco<. Nun vi povas laŭplaĉe malrapidigi aŭ rapidigi la sonon de la programoj.

## 5. MICHAEL JACKSON AVERTANTA (KUN SUBTEKSTOJ EN ESPERANTO)

Ni pasigu dum la alvenantaj festotagoj kelkajn minutojn per pensado: pri la planedo Tero, kiun ni ruinigas ĉiam pli rapide - dum aŭskulto de Michael Jackson. Nia flandra amiko, Leo De Cooman, kun helpo de nia brita amiko David R. Curtis tradukis Esperanten la Ter-Kanton de Michael Jackson kaj pretigis por ni la esperantlingvan subtekston.
Akceptu bonvole la rezulton per musklako al
http://dotsub.com/view/22a97a06-8fc6-4c35-b008-a4ed1c30e002
Ĝi estas filmita en Afriko, Amazonio, Kroatio kaj Novjorko.
Rim.: Koran dankon al Ludoviko Molnár kaj Julinjo Farkas pro la atentigo.

## 6. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO AKTIVAS (oficiala organo de ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)

Ĉeĥa Esperanto-Junularo (ĈEJ) ferminte la 65-an IJK en Liberec' daŭrigas sian agadon kun nova estraro, elektita la 8-an de oktobro 2009 okaze de semajnfina ĈEJ-renkontiĝo en Ostrožská Nová Ves en suda Moravio. Ĝin ĉeestis 24 homoj, inkl. de gastoj el Nederlando kaj Slovakio. Programo okazis ankaŭ en Uherské Hradiště kaj Luhačovice.

Nova prezidanto de ĈEJ iĝis Daniel MRÁZEK, kiu interŝanĝis sian vicprezidantan postenon kun Marek BLAHUŠ. Cetera konsisto restas sama: kasistino Dagmar CHVÁTALOVÁ, komitatmembrino Barbora ZÁVODSKÁ, komitatmembro Miroslav HRUŠKA, membroj de revizia komisiono Tomáš BŘICHÁČEK (ties prezidanto), Petr Adam DOHNÁLEK kaj Karol RYDLO.

Oktobre tri ĈEJ-anoj ĉeestis kaj helpis dum ĈEA-konferenco en Svitavy, tuj poste Marek BLAHUŠ kaj Dan MRÁZEK helpis organizon de InPaSem en Dobřichovice/Prago kaj kelkaj pliaj ĈEJ-anoj aliĝis dum tiuokaza kvarlanda vespermanĝo. La 16-an de oktobro kunvenis la praga klubo, la 20-an la brna.

Marek BLAHUŠ reprezentis la 7-an de oktobro ĉe prelego "Dua esperanto" en Bratislavo kaj finoktobre ĉeestis la renkontiĝon PSKK en Flandrio. Novembra numero de la porknabina revuo In! raportis pri esperanto (http://tinyurl.com/inesperanto). Michal MATÚŠOV aranĝis retan prezenton pri esperanto por ĉeĥoj per la filmserio "Esperanto estas..." (http://esperanto-je.blogspot.com/).

Okaze de la 150-jara jubileo de L. L. Zamenhof kunvenis la 15-an de decembro la praga klubo kaj reprezentantoj de ĈEJ metis florojn antaŭ la pragan ZEO-n. Brna junularo festis kune kun aliaj brnanoj la 16-an. Retpaĝaro de ĈEJ troviĝas ĉe http://cej.esperanto.cz/

7. KALENDARO DE ESPERANTO-ARANĜOJ en Ĉeĥio kaj organizitaj de Ĉeĥio:

2010-01-14, ekde la 15-a horo, Prago, klubejo de KEP (Klubo de Esperantistoj en Prago): Rememor-programo kun filmo rememore al la 10-a datreveno de forpaso de Stanjo (Stanislava Chrdlová), ĉefdelegitino por Ĉeĥio, ĉe-metoda instruistino kaj ĉiĉeronino. Inf.: chrdle@kava-pech.cz

2010-01-23: Komputila seminario en Svitavy. Vidu apartan artikolon. Inf. datumbazo@esperanto.cz

2010-02-07: Kun Esperanto-junuloj kaj kuniklo al la haveno de Kralupy. Duontaga ekskurso. Inf.: esperanto.bloguje.cz aŭ Bára Závodská, zavodska.bara@gmail.com

2010-04-2/4: La 4-a Sabla Printempo. Komuna aranĝo de ĈEA, ĈEJ kaj E@I. Trejnseminarioj kaj prelegoj pri diversaj temoj kadre de „Esperanto kaj Interreto".Samtempe solena inaŭguro de
ekspozicio pri Esperanto en Urba biblioteko.Aliĝoj kaj pliaj informoj
ĉe: pisek@esperanto.cz <mailto:pisek@esperanto.cz>

2010-04-12/18: La 30-a jubilea lingva seminario de AEH en Skokovy (Bohemia Paradizo). Inf. nechvilep@seznam.cz

2010-04-16/18, Adonido, tradicia renkontiĝo de natur- kaj vinamantoj, Ratíškovice. Inf.: melicharkova@seznam.cz

2010-05-7/9: Tradicia maja renkontiĝo de IKUE-sekcio, Spiritekzerca domo en Žirovnice (rapidtrajna stacio „Počátky – Žirovnice", fervojlinio Jihlava – Jindřichův Hradec). Inf.: m.svacek@seznam.cz aŭ www.ikue.org/cz

2009-06-17/20: la 9-a TREP (Turisma Renkontiĝo en Plasy). Plasy u Plzně, Inf. Stanislav Pech esperantoplzen@centrum.cz

2010-06-20: Tradicia renkontiĝo de ĉeĥaj, polaj kaj slovakaj esperantistoj sur la pinto de la monto Ĉantorio. Inf.: suchanekj@seznam.cz

2010-06-24/27: Internaciaj lingvaj kaj turismaj tagoj, Studený (Lužické-montaro). Lingvajn kurson kaj seminarion gvidos prof. Sabine Fiedler (DE) kaj Teresa Nemere (PL). Inf. N. Karbe nokosaksio@googlemail.com

2010-07-11/25: Flugkaravano al Kubo lige al la UK. Vidu apartan artikolon. Inf.: www.kava-pech.cz/kubo aŭ chrdle@kava-pech.cz

2010-08-21/28: Ekotur (Ekoturisma Renkontiĝo), ĉirkaŭaĵo de České Budějovice, komuna renkontiĝo de piedturistoj kaj biciklantoj kun komunaj vesperaj programoj. Info: chrdle@kava-pech.cz

2010-09-17/19: seminario "50 jaroj de E-rondeto Amikeco" en Česká Třebová, Kultura centro Česká Třebová, restauracio "Na horách". Ene de ĝi prelegoj, instaligo de memorŝtono, amuzprogramo kaj komputilkleriga seminario. Organize partoprenos Urba muzeo en Česká Třebová. Inf.: Jana Křížková, jk.esperanto@seznam.cz, aŭ ladislav.kovar@tiscali.cz

2010-10-11/17: InPaSem (Internacia Paroliga Semajno), Dobřichovice apud Prago. Tradiciaj kurso por komencintoj (gvidos S. Marček, SK) kaj seminario por jamaj parolantoj (gvidos M. Blahuš, CZ). Inf.: chrdle@kava-pech.cz

2010-11-18/21: KAEST (Konferenco Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko), Modra-Harmónia, Slovakio, Inf.: Peter Baláž, petro@ikso.net, ekde januaro 2010 aperos detalaj informoj ĉe: http://kaest.ikso.net

2011-05-07/14: La 63-a IFEF-kongreso, Liberec, Kongresa centro Babylon. Inf.: ladislav.kovar@tiscali.cz, aŭ www.ifef.wz.cz.

Ĉu vi ne trovis vian aranĝon ĉi tie? Ne kulpigu nin, sed sendu la informon pri ĝi al chrdle@kava-pech.cz. Nee eblas envicigi aranĝon, pri kiu ni ne scias.

## 8. LASTE SED GRAVE: BONDEZIROJ

Ĉiuj ricevantoj de ĈEA retkomunikoj akceptu amikajn bondeziojn okaze de kristnaskaj kaj jarŝanĝaj festotagoj! Nome de la redaktokonsilio: Petro Chrdle, redaktoro kaj distrubuanto de la ĈEA-retkomunikoj

## GxUSTIGO de ĈEA-retkomunikoj 6/2009

Karaj abonantoj de ĈEA-retkomunikoj,

kvankam mi pasintsemajne dissendis la lastan ĉi-jaran numeron, mi devas ankoraŭfoje turni min al vi kun

1. Pardonpeto, ke mi sendis ĝin pro mia malatento sen indiko de la jaro kaj mumero, do tial mi ripetis ĝin por pli bona orientiĝo (se iu storas ilin), sed pli grave:

2. ĝustigo de du malĝustaĵoj rilate al la datoj en la Kalendaro de Esperanto-aranĝoj en Ĉeĥio (aŭ organizitaj el Ĉeĥio):

2010-04-9/11: La 4-a Sabla Printempo. (atentu ke ne validas la indikita dato unu semajnon pli frue!). Komuna aranĝo de ĈEA, ĈEJ kaj E@I. Trejnseminarioj kaj prelegoj pri diversaj temoj kadre de „Esperanto kaj Interreto“.Samtempe solena inaŭguro de ekspozicio pri Esperanto en Urba biblioteko.Aliĝoj kaj pliaj informoj
ĉe: pisek@esperanto.cz <mailto:pisek@esperanto.cz>

2010-08-14/21 (male unu semajnon pli frue ol indikite): Ekotur (Ekoturisma Renkontiĝo), ĉirkaŭaĵo de České Budějovice, komuna renkontiĝo de piedturistoj kaj biciklantoj kun komunaj vesperaj programoj. Info: chrdle@kava-pech.cz

3. Pro hasteco mi ankaŭ forgesis kutiman informon: En la kalendaro estas envicigitaj nur la eventoj, kiuj okazos en Ĉeĥio, aŭ kiuj estas organizataj el Ĉeĥio. Eksterlandajn eventojn vi serĉu plej bone ĉe http://www.eventoj.hu/kalendar.htm

Esperante je via kompreno mi ankoraŭfoje deziras al vi agrablajn festotagojn kaj amike salutas vin. Petro Chrdle, redaktoro de ĈEA-retkomunikoj